



Kulturaj Kajeroj

E.M.A.H.E. →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj / 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj / 44 - Nantes

P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1967

2

KULTURAJ KAJEROJ

1967

MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

El Gresillon

Pri la Kultura Semajno

F. Charrier

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Rigardo super Turkio

Kio estas saŭna

K. Vaatanen

Perfidaj tradukistoj

P. Devaux

Okaze de la datreveno de la morto de Ch. Darwin.

Pro simioj

Tri poemoj de M. Lermontov

trad. P. Potin

Gravaj datrevenoj

Neĝo (II)

z

Verkita de Pantovskij
trad. de R. Martin

Por via distro

Nia konkurso

P. Chevalier
J. Salasc

Bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulas la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

PIRI LA KULTURA SEMajNO

Tuj post la foriro de la partoprenintoj en la kunveno de JEFO-anoj, la Kulturdomo ankaŭ akceptis, dum la sekvanta semajno, de la 28-a de marto ĝis la 4-a de aprilo, naŭdek ĝesamideanojn, el kiuj dudek stipendiuloj. Esperantistoj el Skotlando, el Anglujo, el Svedujo, el Italujo plezurigis nin, ĉeestante tiun agrablan kaj fruktodonan renkontiĝon. Ili samtempe distris nin kaj konigis nin pri sia lando; niaj skotaj amikoj meritis specialan dankon pro sia agema partopreno.

Francaj aŭ alilandaj anoj same ŝatis la ripozan kaj harmonian pejzaĝon, kiu nepre sukcesis allogi eĉ la malkontentemulojn. Dum kelkaj mallongaj tagoj, ĉiuj vivadis kune en la kastelo kiel anoj de granda familio, pasigantaj fruktodonajn feriojn; feriojn mi skribis, ĉar eĉ la momentoj dediĉitaj al laboro neniel ŝajnis tedaj.

Distron aŭ studon, ĉiuj ĉeestis en egale bonhumora etoso, dank'al hortabelo sagace starigita de la organizantoj. Matene, Sro Turin gvidis kurson, kiu permesis plibonigi la konon de la lingvo, dum Sro Stuit kursis por la komencaĵoj. Li ankaŭ instruis pedagogion ege utilan al ĉiuj, kiuj deziras konigi Esperanton. Posttagmeze, ĉiuj uzis la libertempon laŭ sia deziro, elektante ĉu promenen en milda kaj suna vetero, ĉu vizitojn al interesaj najbaraj lokoj. Sed... oni promesis, ekforirante, ne krokodili! Aliaj kunigis ek de la komenco de la posttagmezo por prepari teatraĵojn, gviditaj de Sro Thierry, aŭ kantojn kun Sinjorino Turin, dum Sro Motillon aŭfable distris aliajn per siaj amuzaj rakontoj.

Baldaŭ, antaŭ la vespermanĝo, oni aŭskultis indajn paroladojn: pri filatelio de Sro Rousseau, pri UNESKO de Sro Thierry, pri Art-parolado de Sro Boyet, interlerneja korespondado de Sro Robert, Strukturo de la Esperanto-movado kaj omaĝo al Sro Pragano kaj J. Baghy.

Ankaŭ filmoj aŭ lumbildoj estis proponitaj: pri Skotlando, Nederlando, Japanujo (oni havis la plezuron aŭskulti japaninon kiu respondis la klarig-petojn), pri Budapeŝto, Sino Chervy raportis pri la lasta internacia kongreso, kaj oni devas ankaŭ danki ŝin, kune kun Sro Motillon pro ilia gvidado dum la ekskurso al la Loire valo.

Tiu ŝargita programo evidente montras kiom da zorgo, laboro kaj sindonemo elspezis la organizantoj. Sro Babin, diskreta kaj efika, Sro Babin, kiu afable gastigis ĉiujn, Sro Boyet, kiu estris la kulturajn arangojn, kaj ĉiuj kiuj helpis igi ilin sukcesaj, ricevu la plej sincerajn dankojn. Ili permesis, ke dum la tute taŭge nomita « kultura semajno », oni ne nur ampleksigis la konon de la lingvo per ĉiutaga praktiko, kaj la konon de la landoj kaj moroj; restado en Grésillon estas pli grava, ĉar pere de instruaj paroladoj kaj homaj kontaktoj, ĝi agas por la disvolvigo de toleremo kaj amo inter la homoj. Multaj el la ĉeestantoj ne konis unu la alian, kiam ili alvenis, sed tuj farigis amikoj, kaj ĉiuj foriris ege emociigitaj, kvazaŭ post longa konatiĝo.

Krome, dum tiu semajno, ili fortigis sian deziron daŭrigi la klopodojn por diskonigi la lingvon kaj partoprenigi multajn amikojn, konatajn aŭ konotajn, al universala mirinda ligilo Esperanto. Restado en Grésillon valoras pro tiu fakto: ke ĝi helpas la anojn igi mense kaj kore pli riĉaj.

Oni povas fidi la ĉiaman sukceson de la someraj periodoj, kaj formuli korajn bondezirojn por la multaj venontaj renkontiĝoj.

Françoise CHARRIER.

Studentino.

Esperanto tra la Mondo



Aliaj someraj renkontiĝoj :

— Internacia esperanta ferio-semajno, en Krommenie (Nederlando), 30-an de julio - 7-an de aŭgusto. Adreso : Sino J.A. v.d. Meulen v. Harten, Popelstr. 13 ; Krommenie.

— Esperantista Kultura Festivalo, en Opava (ĉeĥoslovakio) 7 — 10-an de julio. Adreso : Vleek Frantisek, ul. 28 rijná, Opava-Katerinky.

— Esperanto-seminarioj, organizitaj de Naturamika fako de Hungara esperanto-asocio, ĉe Balaton-lago, en Kaposvar, 1-7 15-8 (tendaroj). Adreso : Naturamika fako de H.E.A.P.K. 630, Budapest 62.

— Internaciaj feriaj esperanto-kursoj, en Helsingör, Danujo 23-30 de julio. Adreso : L. Friis, Ingemannsvej 9, Abyhøj, Danlando.

— Internacia Junulara Kongreso, en Natanja (Israelo) 9-16 de aŭgusto. Adreso : J.K. de Esperanto, P. k. 380, Natanja (Israelo).

El Japanujo :

— Propono de la socialista partio antaŭvivas plilongigon de deviga instruado de la Internacia Lingvo Esperanto al ĉiuj infanoj en la aĝogrupo de 8 ĝis 12 jaroj.

El Pollando :

— La Universitato de Nikolao Kopernik en Torun, Pollando, sekvis la ekzemplon de kvar aliaj polaj universitatoj (en Krakow, Lodz kaj Gliwice), establane por la nuna universitata jaro Lektoraton de Esperanto. La Internacia Lingvo ricevas la saman rangon, kiel nedeviga studobjekto, kiel la lingvoj hispana, itala, sveda.

El Francujo :

Transportebla ekspozicio pri la esperanta literaturo estis aranĝita de Sro Lentaigne, 3 avenue de la Gaillarde, 34 - Montpellier.

Ĝi konsistas el 100 valoraj libroj en 12 kofretoj. Francaj esperantistoj, cirkuligu tiun ekspozicion !

— La iama aktiva « Groupe des Educateurs Esperantistes » reorganizigis. La sekretario estas Sino Trésorier, le Chanois, Chalezeuille, 25 - Roche-lès-Beaupré.

El Hindujo :

Multaj personoj vizitis esperanto-ekspoziciojn prezentitajn dum decembro en la publika biblioteko de Delhio kaj en la Universitato Santiniketan.

Datreveno de LL. Zamenhof :

Esperable, ĉiuj Esperanto-societoj taŭge memorigos en 1967, la 50-an datrevenon de la morto de Zamenhof, kreinto de esperanto, kaj la 80-an datrevenon de la aperigo de la unua gramatika libro.

Fakoj :

— « Ornitologia Rondo Esperantlingva » (sekretario : Sro W. de Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo, projektas ornitologian semajnon, 3-9 de julio, en kastelo, ĉe la vilaĝo Woumen, Belgujo.

— « Eŭropo », trimonata revuo por eŭropofederalistoj komencis aperi, Dick Andree, Balistr. 77, den Haag, Nederlando.

— Turismaj esperantaj revuo kaj asocio. La respondeculo estas Sro Jaumotte, estrarano de U.E.A. Adreso : 44, De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo. Li ankaŭ zorgas pri la aŭtista asocio.

Radio-elsendoj :

La nombro kaj daŭro de radio-elsendoj en la Internacia lingvo atingis novan rekordon en la jaro 1966. La suma nombro en 1966 estis 2290, kaj la elsendoj daŭris entute 769 ½ horojn. Elsendis regule 23 stacioj en 15 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Imitinda Ekzemplo :


Dum marto, S-ro René Llech-Walter, prezidanto de la Franca Unuiĝo, ricevis de Agentejo Peltours el Israelo leteron pri la Esperanto-Krozado al la Universala Kongreso en angla lingvo. S-ro Llech-Walter resendis la leteron kaj klarigis esperantlingve ke li ne komprenas la anglan lingvon. Post kelkaj tagoj li ricevis la leteron sed en esperanto.

Kiam vi skribas al Turismagentejo ĉiam skribu esperantlingve.


Rigardo super...

... Turkio

Post kelkhora aer-vojaĝo vi povas atingi Istanbulon. Kaj tuj la vojaĝanto miras pri la fakto, ke meze de moderna urbo daŭras memoroj de la antikva ĉefurbo. Tra Istanbul la turisto renkontas Bizancon kaj Konstantinopolon, pro la multegaj palaĵoj kaj moskeoj.



La modernaj atingaĵoj utilas al la antikvaj riĉaĵoj. Per tute moderna ŝoseo vi eniras ĝis Kapadoco, stranga lando. De Urgup, ekipita per modernaj hoteletoj. Per tute moderna ŝoseo vi eniras ĝis Kapadoco, moĵ 3.000 jarojn antaŭ Kristo, asertas la arkeologoj.



En tiu lando, konkerita de la Hititoj, la Persoj, la Makedonoj postrestas impresigaj kristanaj ruinaĵoj.

En Goremo ĉie vidiĝas trogloditaj loĝejoj, kie sin kaŝis la unuaj kristanoj. Ankoraŭ montriĝas belaj freskoj en la enrokaj kapeloj. Apud Nevsehir, oni ankoraŭ povas vidi subterajn urbojn el kiuj unu konsistis el sep etaĝoj kaj alia verŝajne loĝigis pli ol 50.000 homojn.

Tien venante per ŝipo, la turisto elŝipiĝas en Izmir. De tiu havenurbo, la ekskursoj estas nombraj :



al Bergamo, naskiĝurbo de Eskulapo; al Efezo, grandega muzeo; al multaj aliaj urboj, paradizo de la arkeologoj. Turkio meritas la nomon « Vojkruciĝo de Civilizoj ».



KIO ESTAS "SAŬNA"

Saŭna konsistas el tri ĉambroj. Ili situas en urbaj domoj aŭ kelkafoje en aparta ligna dometo en la ĝardeno de la familio.

En la unua ĉambro oni sin malvestigas kaj nude iras en alian ĉambron, kie estas forno, kiu varmigas ŝtonojn. La temperaturo estas inter 80 ĝis 130 gradoj. Kompreneble oni sufokas iomete ; kiam oni eniras, sed oni baldaŭ alktumigas, ĉar estas seka temperaturo.

Tie oni sidas sur ligna benko kaj multe ŝvitas. Fakte akvo fluas sur la tuta korpo. Tie oni povas resti dum 15 ĝis 30 minutoj babilante kun aliaj personoj.

Poste oni iras en la trian ĉambron, kie oni uzas sapon kun varma kaj malvarma duŝo. Tiam oni reiras al la varma ĉambro kaj ŝetas akvon sur la varmegaj ŝtonoj. Vaporo inundas la atmosferon kaj brulas la haŭton. Oni povas sin vergi aŭ vergi la najbarojn per branĉoj de betulo.

Fine oni iras al malvarma duŝo kaj revenas al la unua ĉambro, kie oni kuŝas sur benko kaj ripozas.

Ne nur sportuloj kuras nudaj sur neĝo post saŭna, sed ankaŭ pluraj aliaj sin rulas en neĝo kaj reiras en saŭnon sin vergi per branĉoj de betulo. Eĉ multaj virinoj tion kutimas fari. Ankaŭ multaj faras truon en glacio vintre kaj naĝas en lago inter glacipecoj. Eĉ 6 fojojn en unu dimanĉo naĝis unu virino, kiun mi konas, en lago inter glacipecoj kaj intertempe sin banis en sia propra saŭna. Ŝi neniam estas malsana.

Mense kaj fizike estas bona traktado kaj oni diras, ke malvarmumo malaperas same kiel granda kolero.

En pratempoj ne nur familianoj, geviroj kaj infanoj iris kune en saŭnon, sed ankaŭ najbaroj ofte havis kun ili. Plejparte, tiu kutimo ekzistis en kamparoj. Unu varmigis saŭnon kaj invitis

ankaŭ siajn najbarojn bani. Tiutempe la muroj de saŭnoj ne estis entenantaj grandan varmon kaj precipe vintre estis malfacile konservi saŭnon sumultaj, kiel eble. Sed la familianoj ankoraŭ nunfiĉe varma por longa tempo. Tial oni iris kune tiel tempe iras kune en saŭnon. Kompreneble ne ĉiuj, sed laŭ kondiĉoj en kiu ili vivas. Nuntempe multaj loĝas en grandaj domoj, en apartamentoj. En unu granda domo ĝenerale estas unu aŭ povas esti eĉ du saŭnoj. La enloĝantoj povas lui saŭnon por unu aŭ du horoj. Ĝenerale ili luas por tuta familio. Se iuj el la familianoj ne deziras sin bani samtempe kun siaj gepatroj, ili banas sin en iu alia saŭno, aŭ publika aŭ privata. En publikaj saŭnoj estas aparta flanko por ambaŭ seksoj, ankaŭ por familioj. Kiuj havas propran saŭnon, tiuj varmigas ĝin laŭvole kaj banas sin laŭ interkonsento kun aliaj familianoj.

En la domaro, kie mi loĝas, ni havas du saŭnojn. Ĉiu familio havas unu difinitan horon ĉiusemajne. Post bano aldone duon horon por sin vesti iomete. Estas du sinvestejoj en ĉiu saŭno. Alia familio povas iri en la alian kaj poste komenci bani. La familianoj banas sin kune. Por personoj, kiuj je tiu momento laboras aŭ estas en lernejo ni havas du apartajn horojn por virinoj kaj ankaŭ same por viroj du horojn ĉiusemajne. Tiel ĉiuj havas okazon sin bani unufoje en semajno.

Por ni finnoj saŭno ne estas nur sinbanado, sed ĝi estas rito. Oni kutimigas infanojn al saŭno jam ekde ilia unu monata aĝo. Tial ni povas elporti varmegon en saŭno, samkiel la eksterlandanoj elportas pli da vino, ĉar ili kutimigas al vino jam ekde sia infanaĝo.

Nuntempe saŭna estas maloftaĵo en Francujo sed eble tiu finna kutimo-traktado venos kiel nova modo.

Kerttu VAATANEN.



ABONU

**ABONIGU VIAJN
AMIKOJN**

P. BABIN

13, bd de la Chauvinière — 44 - NANTES
p.k. : Nantes 2-813-61

PERFIDA! TRADUKISTOJ

Mia afabla majstro Marcel Prevost asertis ke la scipovo de pluraj lingvoj estis la kapablo diversmaniere diri la saman stultaĵon. Eble li pravis en 1910, epoko de sentimentala memsufiĉeco... Sed nun pasis la tempo kaj miksiĝis la popoloj, tiuj malfeliĉaj popoloj, kiuj memorigas pri la balbutaĉantaj, ne kompreneblaj, senvoĉaj masonistoj, kiuj staris ĉe la piedo de la Babel-turo !

La elektro-teknikistoj — denove ! — suprenfaldis siajn manikojn kaj konstruis traduk-maŝinojn ; kiu kapablas fari multon, tiu ankaŭ malmulton povas fari : ne pli malfacile estas por maŝino trovi vorton sur vort-magneto-bendo ol fari 100.000 adiciojn en unu sekundo aŭ desegni la vojiron de raketo. Kompreneble ekzistas malfacilaĵoj. La maŝino ne devas kontentiĝi per laŭvorta traduko. La gramatik-cirkvitoj devas interveni por purigi la tradukon kaj ĝin modeli laŭ la kutimaj uzoj de la lingvo. Ekzemple, ni tajpas sur la klavero : « the white flower » (la blanka floro). La maŝino trovas la tri francajn vortojn : « le blanc fleur ». Sed ĝi hezitas, memriproĉas. La gramatik-cirkvitoj intervenas por akordigi la artikolon kaj la adjektivon ; kaj triumfe eliras la neri-proĉeblaj vortoj : « la blanche fleur ».

Sed se mi tajpas : « les poules du couvent couvent » (la kokinoj de la monaĥejo kovas), tiam kuŝas kelkaj insidoj. Unue la maŝino ne traduku « poules » per iu « ĉiesulin »-senca vorto. La cirkvitoj flaras la substantivan naturon de la unua « couvent » antaŭita de artikolo kaj la verban naturon de la dua. La usonaj elektro-lingvistoj asertas ke, per 100 gramatik-cirkvitoj, konscienca maŝino povas tute facile traduki la Shakespeare-an aŭ Poe-an lingvon en la Gogol-an aŭ Racine-an.

Sed ankaŭ facile estas turmenti la traduk-maŝinon, petante ĝin traduki « ire kaj revene ». Proponu al ĝi belan franclingvan frazon por traduko al la rusa lingvo, ekzemple, kaj retraduko al la franca. La « malamikoj » de la traduk-maŝinoj asertas, ke oni

ricevis agrablajn rezultojn tiajn, kia la sekva : « l'esprit est prompt, mais la chair est faible » (menso estas rapida sed karno estas malforta). La retraduko fariĝas, post ir-revena tradukado tra la rusa lingvo : « le spiritueux est rapide mais la viande est ramollie » (la alkoholaĵo estas rapida sed la viando estas mola). Tra la angla lingvo la teknika frazo : « le germanium est un semi-conducteur » (germaniumo estas semikonduktilo) fariĝas : « l'allemand est la moitié d'un chef d'orchestre » (Germano estas duono de orkestrestro). La proverbo anglalingva (out of sight, out of mind » (for de la okuloj, for de la koro) estis krude tradukita « l'invisible est idiot » (nevideblaĵo estas idiota), kio pravas senuancon materialismon !

La traduk-maŝinoj estas tre ĝentilaj. Firmao prezentis en Parizo dek-lingvan traduk-maŝinon, kapabla informi vin en la franca, angla, germana, itala, hispana, portugala, sud-afrika, esperanta, nederlanda, sveda lingvoj... kun saluto en la elektita lingvo.

— « Kiu tago estis la 2a de januaro 1897 ? »

« Sabato. Dankon sinjoro. »

— « Kiu tago estis la 29a de februaro 1900 ? »

Kraketaĵoj, ruĝaj fulmoj...

« La 1900a jaro ne estis superjaro. Mi bedaŭras, sinjoro. »

Sed respondon ne povis doni tiu maŝino, kiam mi demandis :

— « Kiu tago estis la 18a de Brumero (Nebulmonato) » (1).

Tiu usona maŝino nenion sciis pri la Franca Historio.

Tradukita el artikolo de Pierre DEVAUX.

(1) Dum la franca revolucio la kalendaro ŝanĝiĝis. Brumero estis la dua monato de la respublika kalendaro (22an de oktobro-21an de novembro).




Vi deziras viziti Grésillon ?

TUJ REZERVU VIAN ĈAMBRON

Okaze de la 85-a DATREVENO...
DE LA MORTO DE CHARLES DARWIN

Pro Simioj

En 1925, John Thomas Scopes, nur 20 jara, instruis biologion en mezgrada lernejo en Dayton en Tennessee, unu el la Usonaj ŝtatoj. Oni konsideris lin originalulo pro tio, ke li dancis kaj fumis cigaredojn! Iam li konfesis al amiko : « Mi verŝajne malobeis ŝtatan leĝon ». — « Kiel ? » — « Ĉar mi uzas en la lernejo libron, kiu malobservas la ĵusvoĉdonitan leĝon « kontraŭ-evolucian ». Tiu leĝo malpermesis la instruon de « ĉiu teorio neanta la kreadon de la homo fare de Dio, kaj asertanta, ke la homo devenas de malsupera besta specio ».



La iniciatinto de tiu leĝo estis iu farmisto, kiu nur deziris, ke la infanoj respektu la Biblion kaj sciis nenion pri Darwin. Li ne deziris « fari bruon ». Sed la amiko de Scopes, George Rappelyea volis « fari bruon » ĉar li tute malkonsentis pri la « kontraŭ-evolucia » leĝo. Kun konsento de Scopes li denuncis lin.

La akuzanto estis William Jennings Bryan, prezidanto de la Demokrata Partio en 1896, kaj ĉefo de la « Fundamentistoj », kiuj postulis, ke oni konsideru esenca la tradician interpretadon de la Biblio ; ili konsistigis la pli konservativan parton de la protestantaj sektoj. Li mem insistis por ke oni deklaru kontraŭleĝa la instruon de evoluismo.

La defendanto, Clarence Darrow, advokato en Ĉikago, jam batalis pere de gazeto kontraŭ la pretendoj de Bryan. Li eĉ preparis demandaron el kvindek precizaj demandoj, kiujn li petis Bryan respondi. Sed la ĉefo de la Fundamentistoj rifuzis. La proceso kontraŭ Scopes estis por Darrow okazo publike prezenti al Bryan la demandaron. Li proponis defendi Scopes tute senpage kaj ricevis la apogon de la Usona Unuiĝo por defendo de Civitanaj Liberoj.

La loĝantoj de Dayton, ne tre evoluintaj, tute ne sciis ion ajn pri evoluismo ; sed timigis ilin kaj malplaĉis al ili, ke oni pretendis ke svarmas la simioj sur iliaj genealogiaj arboj. Sed ĉar ili estis nature gastigemaj ili alportis dolĉaĵojn al Darrow kaj eĉ demandis ĉu li estas « komforta ». Ilin timigetis la alveno de tiom da ĵurnalistoj, fotografistoj, scienculoj, instruistoj, kredantoj, nekredantoj. En la montrofenestroj oni vidis afiŝojn kun simioj kaj kokonuksoj. Super la pordo de J.R. Darwin, vestaĵ-vendisto, oni legis « Darwin rajtas » kaj sube, en malgrandaj literoj «...interne ». La Fundamentistoj trairis la urbeton nud-piede admonante la preterpasantojn al penton. En la tribunala ĉambro la ĉeestantoj estis sen jakoj kaj faris ventumilojn el palmobranĉoj.

La sintenon de Bryan, la akuzanto, oni povas resumi jene : « Se evoluismo gajnos, Kristianismo malaperos ». Siaflanke Darrow respondis : « La akuzanto revenigas nin al

la Mez-epoko. Se li gajnos neniun homan kredon estos ŝirmata kontraŭ persekutado ».

Darrow ne diris, ke Scopes ne malobeis la leĝon sed fondis sian argumentadon sur la diversaj interpretadoj de la Biblio kaj sur la fakto, ke evoluismo povas akordiĝi kun la Genezo. Por tion pruvi li petis, ke oni aŭskultu eminentulojn pri studado de la Biblio sed la juĝisto Raulston respondis, ke nur Scopes estis akuzita ne evoluismo aŭ religio.

La duan tagon Darrow elprenis el sia poŝto la demandaron, kaj malrapide faris la demandojn, kiuj multe embarasis Bryan. Al la tro precizaj demandoj Bryan respondis nur : « Mi kredas ĉion, kion oni trovas en la Biblio ». Al protesto de la akuzanto, la defendanto respondis : « Mi rajtas vin demandi pri viaj stultaj ideoj jam forĵetitaj de ĉiuj intelligentaj kristanoj ». Kaj li petis de la juĝantoj, ke ili kondamnu Scopes, por ke li povu apelacii al la Alta Kortumo de Tennessee. La juĝantaro kondamnis Scopes je

monpuno 100 dolara. Kvin tagojn poste W.J. Bryan, la akuzinto, mortis post kolosa manĝo.

Ĉe la Alta Kortumo de Tennessee, du juĝantoj diris ke la « kontraŭ-evolucia » leĝo estis konstitucia kaj du aliaj, ke ĝi estas kontraŭ-konstitucia. Laŭ la decido de la Kortumo la defenda advokato ne povis apelacii al la Alta Kortumo de Usono sed, ĝi ankaŭ diris, ke oni de nun ĉesigu ĉiun tian proceduron. Oni do ne plu observu la leĝon.

De tiu tempo la politika influo de la Fundamentistoj malfortiĝis. En la mezlernejoj oni instruis evoluismojn. Kaj kiam, en Kentucky, oni proponis la voĉdonon de kontraŭ-evolucia leĝo, alia persono proponis, ke ankaŭ leĝon devigantan la riveron flui du direkten oni voĉdonu !

(El artikolo aperinta

« Informations et Documents »).

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Petu la someran programon

Ne pli longe atendu

Tuj aliĝu

E. K. D. Grésillon - 49 - BAUGÉ Francujo

TRI POEMOJ DE MIĤAIL LERMONTOV

(Verkitaj Originale en la Franca Lingvo)

Tiuj poemoj estas tradukitaj de franca esperantistino laŭ peto de ŝia rusa amiko, la poeto Aleksandro Logvin el Moskvo. Li mem verkis la piednotojn.

—o—o—o—o—o—o—o—o—o—o—

Se mi kredus al mia espero,
Mi atendus pli bonan estonton.
Al vi tutproksima per mia memoro
Mi apude restos spite la distancon.
Vagante sur alibordo
Tie, fore, mi vin sekvos,
Se super vi muĝus tondro,
Alvoku min, mi revenos.

* * *

Ĉi tiu poemo estis enskribita en la albumon de A.M. Verŝaĝina en 1832 j.

—o—o—o—o—o—o—o—o—o—o—

Se mi vidas vin rideti,
Mia koro tuj ekfloras,
Kaj mi volus al vi diri,
Kion la kor' al mi diras !

*

Tiam ĉe mia rigardo
Ekaperas tuta vivo :
Mi malbenas, mi preĝas,
Ankaŭ sekrete ploras.

*

Ĉar sen vi, sola gvidanto,
Sen via fajra okulo,
Vana ŝajnas la paseo
Kiel Cielo sen Dio.

*

Jen, pro stranga kaprico,
Eĉ okazis, ke mi benis
Belan tagon, ho ! Anĝelo,
Kiam vi min suferigis.

* * *

Tiu-ĉi poemo estis elprenita de « Bibliografiaj Notoj ». Dato de verkado ne estas determinita.

ATENDO

Mi atendas ŝin en sombr' ebeno ;
Fore ombro vidata blankiĝas,
Ombro lante alproksimiĝanta...
Ne, estas nur trompiga espero :
Unu kaduksaliko balancas
Ŝian trunkon, brila, sekigita.

*

Mi kliniĝas kaj longe aŭskultas :
Mi image aŭdas sur la vojo
Etan sonon de leĝera paŝo...
Ne, nenio ! Sur la musko estas
Bruo de ventpuŝita folio,
Parfumita vento de la nokto.

*

Plenplena d'amerega tristeco
Mi sterniĝas sur la densan herbon
Kaj mi falas en profundan dormon...
Subite, mi tremas en vekigo :
Ŝia voĉo flustras en mian orelon !
Ŝia buŝo kara kisas mian frunton !


* * *

« Atendo » estis sendita de M. Lermontov al lia amikino S.N. Karamzina (filino de la fama rusa verkisto kaj historiisto) en letero de la 10-5-1841 j.

Tradukis la tri poemojn

Paule POTIN.

GRAVAJ



DATREVENOJ


Antaŭ 70 jaroj mortis en Vien :

Johannes BRAHMS. — Filo de malriĉa muzikisto, J. Brahms fariĝis konata nur jam maturaĝa, kiam li estis ĥorestro de la Kanto-Akademio en Vien. Poste, li ankoraŭ pli famiĝis, kiel koncert-virtuozo. Liaj plej konataj komponaĵoj estas du cent lidoj, sonatoj por piano, kvarteto kaj kvinteto.



Antaŭ 200 jaroj mortis en Hamburgo :

Georg, Philipp TELEMANN. — Per persista laboro kaj neelĉerpebla kreo-povo, tiu komponisto fariĝis unu el la plej rimarkindaj muzik-verkistoj antaŭ Bach kaj Händel. Oni ne konsideras lin antaŭvenanto, sed oni agnoskas lian personan valoron rilate la instrument-muzikan komponadon. Nuntempe, oni ankoraŭ ludas multajn el liaj komponaĵoj.



Antaŭ 70 jaroj naskiĝis en Madison (Usono) :

Thornton WILDER. — Filo de usona konsulo, li famiĝis per siaj rakontoj kaj teatraĵoj : « Ni refoje bone elturniĝis », « Nia urbeto », kiuj estis prezentitaj sur multaj scenejoj. La usona Pulitzer premio estis al li atribuita en 1953.

VERKITA DE PANSTOVSKIJ

ESPERANTIGITA DE ROBERT MARTIN

Nego (1943) ⁽²⁾

En la trajno, leŭtenanto Nikolaj Potapov prikalkulis, ke ĉe sia patro li ne povos resti pli ol unu tagnokton. Lia forpermeso estis tre mallonga kaj la veturado forprenis preskaŭ la tutan tempon.

La trajno atingis la urbeton tage. Ekde la alveno al la stacidomo, la leŭtenanto estis informita de la estro, ke lia patro mortis antaŭ unu monato, kaj ke en ilia domo enloĝiĝis juna kantistino kaj ŝia filino el Moskvo — evakuitaj, — diris la staciestro.

Potapov silentis kaj rigardis tra la fenestro : kuradis kun tekruĉoj vojaĝantoj en vatitaj vestoj kaj feltobotoj. Li ricevis kapturiniĝon. — Jes, — diris la estro de la stacidomo, — via patro estis bonega homo. Kaj li ne sukcesis vidi sian filon ankoraŭfoje.

— Kiam mi havos reirantan trajnon ? — demandis Potapov.

— Nokte, je la kvina, — respondis la staciestro, kiu iomete silentis kaj poste aldonis :

— Vi venu en mian domon. Mia maljunulino trinkigos al vi teon kaj manĝigos vin. Vi ne bezonas iri al via domo.

— Dankon, — respondis Potapov kaj li foriris.

La estro sekvis lin per siaj okuloj, kaj kapbalancetis.

Potapov marŝis tra la urbo, al la rivero. Super ĝi ŝvebis cendrokolora ĉielo. Inter la ĉielo kaj la tero oblikve flugadis kelkaj neĝeretoj. Sur sterkoplena vojo iradis monedoj. Krepuskiĝis. La vento blovis el la arbaro, el tiea riverbordo, kaj ĝi elfluigis larmojn el la okuloj. — Nu ! — diris Potapov. Mi malfruiĝis. Kaj nun ĉio por mi ŝajnas fremda : ĉi-tiu urbeto, kaj rivero kaj domo. Li ĉirkaŭrigardis la ravinon trans la urbeto. Tie kuŝis la ĝardeno kovrita de prujno, malhelis domo. El ĝia kamentubo altiĝis fumo. La vento puŝblovis la fumon en la betul-arbareton. Potapov malrapide iris flanken al la domo. Li decidis ne eniri la domon sed nur laŭiri ĝin, eble ŝtelrigardi en la ĝardenon, kaj halti en la maljuna laŭbo. La penso pri tio, ke en la patra domo vivas aliaj indiferentaj personoj, estis neelportebla. Plibone estus vidi nenion, ne turmentit koron, foriri kaj forgesi la pasintecon ! — Nu ! — pripensis Potapov, ĉiutage mi maturiĝas, kaj mi pli kaj pli severe rigardas ĉirkaŭ mi.

Potapov alproksimiĝis al la domo en mal-lumo. Li atente malfermis la latispordeton, sed tamen ĝi knaris. La ĝardeno ŝajnis ektremi. De sur branĉetoj susurfalis neĝo. Potapov ĉirkaŭrigardadis. Al la laŭbo kondukis senneĝigita aleo. Potapov eniris la laŭbon, apogis siajn manojn sur la maljunan balustradon. Malproksime, trans la arbaro, malbrile roziĝis la ĉielo ; sendube, de malantaŭ la nuboj altiĝis la luno. Potapov forprenis sian kaskedon, kaj mankombis sian hararon. Estis tre silente, nur malsupre, piede de la monteto, tintadis malplenaj siteloj portataj de virinoj, kiuj iradis al la truo en la glacio por ĉerpi akvon.

Potapov alkubutiĝis al la balustrado, kaj flustris :

— Kiel tio estas tiel ?

Iu delikate tuŝis lian ŝultron. Li rigardis. Malantaŭ li staris juna virino kun blanka serioza vizaĝo, kaj kies kapo estis kovrita per varmeta fulardo. Ŝi silente rigardadis Potapov per malhelaj atentemaj okuloj. Sur ŝiaj okulharoj kaj vangoj degelis neĝo, sursutetita, sendube, el branĉetoj.

— Surmetu vian kaskedon — flustris la virino, — vi malvarmumos. Kaj ni eniru hejmen. Ne bezonas resti ĉi-tie.

Potapov silentis. La virino prenis lin per la maniko kaj kondukis lin laŭ la senneĝigita aleo. Apud la perono Potapov haltis. Spasmo premis lian gorgon, li ne povis spiri. La virino denove flustris :

— Ne gravas. Kaj mi petas, ne estu ĝenata pro mi. Tio tuj forpasos. Ŝi piedfrapadis, por disbati la neĝon el botoj. Tuj en la vestiblo eksonegis la sonorilo. Potapov ege enspiris kaj denove normale spiris. Li eniris la domon, konfuzo murmuris ion, demetis sian mantelon en la vestiblo, flaretis la feblan odoron de betula fumo kaj ekvidis Arhip'on. Arhip'sidis sur la sofo kaj oscedis. Apud la sofo staris knabino kun harplektaĵoj kaj per siaj okuloj ĝojplenaj ŝi rigardis Potapov, ne lian vizaĝon sed la orajn galonojn de la maniko.

— Venu ! — diris Tatiana Petrovna kaj ŝi kondukis Potapov en la kuirejon. Tie en kruĉo estis malvarma puta akvo, pendis konata lintola tualettuko kun broditaj kverkaj folioj.

Tatiana Petrovna eliris. La knabino alportis

al Potapov sapon kaj ŝi rigardis, kiel li lavas sin, demetinte ŝian uniformon. La konfuzo de Potapov ankoraŭ ne forpasis.

— Kiu do estas via panjo? — li demandis al la knabino kaj li tuj ruĝiĝis. Tiun demandon li faris, nur por demandi ion.

— Si opinias, ke ŝi estas matura, — konfidence flustris la knabino. — Sed ŝi tute ne estas matura. Si estas pli knabineca ol mi.

— Kial? — demandis Potapov.

Sed la knabino ne respondis, ŝi ekridis kaj eliris el la kuirejo, Potapov la tutan vesperon ne povis sin liberigi el stranga sento, kvazaŭ li vivas en malpeza sed profundega dormo. Ĉio hejme estis tia, kia li volis vidi. La samaj muzikaĵoj kuŝis sur la piano, la samaj spiralformaj kandeloj brulis kraketadante kaj lumigis la etan patran kabineton. Eĉ sur la tablo kuŝis liaj leteroj el la hospitalo — ili kuŝis sub la sama maljuna kompaso, sub kiu patro ĉiam metis leterojn.

Post teo Tatiana Petrovna kondukis Potapov al la tombo de la patro, malantaŭ la arbareto. Nebula luno levis sin jam alte. En ĝia lumo malforte brildis betuloj, kiuj ŝutis subtilajn ombrojn sur la neĝo.

Kaj poste, ĉe l'vesperfino, Tatiana Petrovna sidante ĉe la piano, kaj delikate tuŝante klavojn, sin turnis al Potapov kaj diris :

— Ĉiam ŝajnas al mi, ke mi jam vidis vin ie.

— Jes, eble, — respondis Potapov.

Li rigardis ŝin. Lumo el kandeloj falis oblikve, lumigis duonon de ŝia vizaĝo. Potapov stariĝis, marŝis en la ĉambro, el angulo al angulo kaj haltis.

— Ne, mi ne povas memori, — li diris per obtuza voĉo. Tatiana Petrovna sin turnis, time rigardis Potapov sed respondis nenion.

La sofo en la kabineto estis preparita kiel lito por Potapov, sed li ne povis ekdormi. Ĉiu minuto en tiu domo ŝajnas al li grandvalora, kaj li ne volis perdi eĉ unu.

Li kuŝis, aŭskultis la ŝtelmovajn paŝojn de Arhip', la tintadon de la horloĝo, la frustradon de Tatiana Petrovna, — ŝi parolis pri io kun la vartistino, malantaŭ la fermita pordo. Poste la voĉoj silentiĝis, la vartistino foriris, sed la strio de lumo sub la pordo ne estingiĝis. Potapov aŭdis, kiel susuras la paĝoj de iu libro, — Tatiana Petrovna, sendube, legis. Potapov konjektis : Ŝi ne enlitiĝis por ke ŝi povu vekti lin por lia trajno.

Li volis diri al ŝi, ke ankaŭ li ne dormas, sed li ne decidiĝis voki Tatiana Petrovna.

Je la kvara matene Tatiana Petrovna senbrue malfermis la pordon kaj vokis Potapov. Li komencis moviĝi.

— Jam estas tempo ; vi devas leviĝi, — ŝi diris. Mi tre bedaŭras vin vekti !

Tatiana Petrovna kondukis Potapov al la stacio tra nokta urbo. Post la dua sonorado ili adiaŭis unu la alian. Tatiana Petrovna etendis al Potapov ambaŭ manojn kaj diris :

— Skribu. Ni nun estas kvazaŭ parencoj. Ĉu ne ?

Potapov nenion respondis ; li nur kapsignis. Post kelkaj tagoj Tatiana Petrovna ricevis de Potapov survoje leteron :

« Mi memoris, kompreneble, kie ni renkontiĝis, — skribis Potapov — sed mi ne volis paroli al vi pri tio tie, hejme. Memoru. Krimeo dum 1927-a jaro. Aŭtuno. Maljunaj platanoj en la parko de Livadia. Malheliĝanta ĉielo, pala maro. Mi iris laŭ vojeto al Oreanda. Sur benko apud la vojeto sidis junulino. Ŝi ŝajnis esti ĉirkaŭ 16 jara. Ŝi ekvidis min, stariĝis kaj alvenis al mi renkonte. Kiam mi estis vid'al vide mi levis miajn okulojn al ŝi. Ŝi pasis apud mi rapide, piedlerte, tenante en mano malfermitan libron. Mi haltis kaj longe rigardadis ŝin forirantan. Tiu junulino estis vi. Mi ne povis erari : mi regardis vin forirantan kaj tiam sentis, ke laŭlonge mi preferis virino, kiu povus aŭ detrui mian tutan vivon, aŭ doni al mi grandegan feliĉon. Mi komprenis, ke mi povas ami tiun virinon ĝis tuta forgo de mi men. Tiam mi tuj sciis ke mi devos trovi vin, je kia ajn kosto. Jen tiel, kiel mi tiam pensis, sed mi ne moviĝis. Kial — mi ne scias. De tiu tempo mi ekamis Krimeon kaj tiun vojeton, kie mi ekvidis vin nur unu momenton kaj perdis vin por ĉiam. Sed la vivo montris sin kompatema al mi, ĉar mi renkontis vin. Kaj se ĉio finiĝos bone kaj se vi bezonas mian vivon, ĝi kompreneble, estas via. Jes mi trovis sur la patra tablo mian malfermitan leteron. Mi ĉion komprenis kaj mi povas nur danki vin el malproksime ».

Tatiana Petrovna remetis la leteron sur la tablon, rigardis per okuloj ombrumitaj de emocio la neĝkovritan ĝardenon tra la fenestro kaj ŝi diris : — O Dio mia, mi neniam estis en Krimeo ! Neniam ! Sed ĉu vere, nun, tiu povas havi iun ajn signifon ? Kaj ĉu estas necese seniluziigi lin ? Kaj mi mem ?

Ŝi ridetis, kovris siajn okulojn per mano. Tra la fenestro flamis sunsubiro malhele ruĝa. Kiu neniel povis estingiĝi.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En ĉi tiu numero vi trovos la du lastajn problemojn de nia konkurso 66-67. Mi petas, ke vi bonvolu sendi viajn solvojn kiel eble plej rapide, antaŭ la fino de Majo, por ke ni aperigu la rezultojn en la venonta numero. Sendu viajn respondojn rekte al :

Sro Pierre CHEVALIER

19, bd Gabriel-Lauriel, 44 - Nantes (Francujo)

Unua problemo : 20 poentoj.

Ses proverboj

- 1) KRV L KRV KLN N PKS
- 2) BN KNSCNC STS L PLJ ML KSN
- 3) MN D NFN RPD PLNGS
- 4) BT D PTRN N LNG DLRS
- 5) L FRMD PS N FCL PGS
- 6) FT KNTS L BS KM PLRS L KR

La supraj ses linioj entenas ses konatajn proverbojn, sed nur iliajn konsonantojn, ĉar ĉiuj vokaloj estas ellasitaj. La konkursa tasko estas : remeti ĉie la ĝustajn vokalojn kaj tiel trovi la kompletajn tekstojn de la ses proverboj.

Dua problemo : 20 poentoj.

Komplika problemo.

En fervoja vagonaro kuranta inter la urboj Blanktur kaj Ruĝmur, laboras tri fervojistoj : kamarado Ruĝcap, kamarado Diknuk kaj kamarado Fortman. Unu el ili estas la maŝinisto, alia la hejtisto, kaj la tria la bremsisto.

En tiu sama vagonaro sidas tri komercistoj, nome : Sro Ruĝcap, Sro Dikmuk kaj Sro Fortman. Sro Diknuk loĝas en Blanktur kaj la bremsisto loĝas en Ruĝmur. Sro Ruĝcap perlaboras ĉiujare 16.000 stelojn. K-do Fortman pli bone kartludas ol la hejtisto. La bremsisto perlaboras ĉiujare 8.000 stelojn, sed unu el la nomitaj tri komercistoj, loĝanta en la sama strato, perlaboras en la jaro la trioblon. Tiu pasaĝero, kiu havas la saman nomon, kiel la bremsisto loĝas en la urbo Nigrangul.

Diru la nomon de la maŝinisto. (Bonvolu klariĝi mallonge vian respondon).

Pliaj respondoj (uzotaj nur por dispartigi la eventualajn ekvalgajntojn) :

1) Kiom da personoj partoprenis la konkurson 66-67 ?

2) Al kiom da nacioj apartenas tiuj konkurstantoj ?

3) Kiel nomiĝis la gazeto, kiu raportis pri la vivo en Grésillon antaŭ ol ekzistis « Kulturaj Kajeroj » ?

4) Kiu estas la dato de la unua numero de tiu gazeto ?

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la antaŭa problemo :

M	A	L	B	O	N	U	L	O	■
O	L	E	■	L	E	S	I	V	O
N	E	G	L	I	Ĝ	■	G	A	D
O	N	I	■	B	E	M	O	L	O
M	O	N	T	A	R	O	■	■	R
A	■	D	I	N	A	S	T	I	O
N	I	A	■	O	■	K	A	R	■
I	N	■	A	■	P	I	R	O	L
O	G	I	V	O	■	T	I	N	E
■	O	Z	O	N	O	■	F	I	D

Nova problemo (Sro Salasc) :

Vorto ĉeno. — Helpe de la sekvantaj difinoj, trovu 15 trisilabajn vortojn kiuj devos formi ĉenon tiamaniere, ke ĉiu vorto komenciĝu per la meza silabo de la antaŭa vorto, kaj la unua silabo de la unua vorto komenciĝu per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri duliteraj silaboj.

Difinoj. — 1) samokupulo. — 2) kuniklego. — 3) kontrakto pri asekuro. — 4) kriptogama vegetaĵo. — 5) ĉarma infaneto. — 6) sovaĝa arbeto. — 7) el lakta kremoj. — 8) alta vira voĉo. — 9) migranta homo aŭ popolo. — 10) difekta punkto. — 11) multuza bileto. — 12) ekstretoj de sferasko. — 13) koleoptero. — 14) legomo. — 15) sinonimo je baroko.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Gramatiko per bonhumoro

« La uzo de **DA** estas limigita per du kondiĉoj :

— la antaŭa substantivo devas havi signifon de mezuro,


— la posta substantivo (suplemento) devas esti nepre nedefinita.

DA respondas al la demando : Kiom multe ?

DE respondas al la demando : Kiaspeca tiu grupo ? ».



— Kian grandan parton da vivo-aspekto la skulptisto donis al ŝi !



— Kiamaniere vi atingis tiom de la moderna eleganteco ?



— Mi ne sciis, ke ekzistas tiom da ĉapel-specoj !


21 jul - 3 aŭg VEA - seman.
3-10 aŭg Madrid 10-17 Saraguno!

16-23 aŭg SLEO Aix
5-7 sept. Toulon

Pureshi
25 kole S. Dumer
Pauvre

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, la, BARCELONO 90 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.) per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anonciĝajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo